

Resumo¹

Fizika teorio kun nur rilatoj kaj ne sendependa spaco kaj tempo nomiĝas *rilatan teorion*. Ernst Mach estis rilatisto, sed li ne havis kompletan teorion. Albert Einstein, inspirata de Mach, serĉis kompletan rilatan teorion. Ĉi tiu serĉado rezultis al la ĝenerala teorio de relativeco. Ĉu ĉi tiu teorio estas Macha (maĥa)? Kio signifas, ke teorio estas maĥa?

En ĉi tiu scienca eseo mi argumentas ke la ĝenerala teorio de relativeco estas relata, sed ne maĥa. Ĉi tiu argumentado ekas kun kritiko de Mach pri *Principia* de Newton. Mach enkondukis alternativon de la unua leĝo de Newton, en kio li ne uzis la koncepton de absoluta spaco. Kiel devas ni interpreti ĉi tiun alternativon?

Plue la serĉado de Einstein al relata teorio de gravito estas eksplikata. Kelkajn ecojn de ĝenerala teorio de relativeco ni studos. Finfine ni skizos relatan interpretadon de ĉi tiu teorio. Ĉi tiu interpretado montras, ke la ĝenerala teorio de relativeco sugestas rilatismon. Tamen la teorio ne estas kompleta priskribo de nia sperto de la mondo, ĉar la teorio entenas nevideblajn objektojn. Rilate al tio ĉi, la ĝenerala teorio de relativeco ne estas maĥa teorio.

¹Por la kompleta scienca eseo, "Mach, Einstein and Relationalism", bonvolu vidi <http://www.phys.uu.nl/~hulten/thesis.pdf> (angla).